


La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 14 Januaro-Februaro-Marto 1991

ISSN 0986-1181



Nun pasis tri jaroj de kiam fondiĝis la asocio "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto". Tri jaroj ankaŭ de kiam aperas nia bulteno "La Letero de l' Akademio de Esperanto". La nombro de la membroj kaj de la legantoj kreskas malrapide sed certe. Mi ne dubas, ke ĉiu numero estas legata ankaŭ de pluraj legantoj.

Ni devas nin gratuli pro la pasintjara elekto de nova presisto: montriĝas ke Coconnier el Sablè, fakte tradicia presisto de la Franca Esperanto-movado daŭre estas pli modera en siaj prezoj ol alilokaj presistoj. Farte nun la dissendado kostas pli ol la presado, malgraŭ la fakto, ke ni akiris pli avantaĝan tarifon.

Punkto plibonigenda en Parizo estas la malgranda skipo ĉirkaŭ la redaktoro: ni tre forte gratulu kaj danku S-inon Thierry kaj S-ron André Bourdeaux, kiuj efektivigas grandegan laboron. Sed iliaj ŝultroj ne sufiĉas. Kiuj helpos?

Inter la planoj por la estonteco estas la kreo de fonduso por legantoj el nepagipovaj landoj: ankaŭ per ĝi kreskus le nombro de niaj legantoj: fakte ni jam sendas "La Leteron" en diversajn landojn sed ne povas fari multon sen aparta buĝeto. La ricevantoj el tiuj landoj des pli alte ŝatas niajn artikolojn, kiel atestas la leteroj alvenantaj al la redakcio.

Ni scias, ke ĝenerale niaj legantoj ŝatas "La Leteron", trovas ĝin alloga, preferante tamen la artikolojn de ĝenerala intereso kontraŭ la tro apartaj aŭ tro personaj. Iuj traŝe resumis la celon de nia organo: "ĝi estas vere bona ideo por disvastigi prilingvajn informojn por ĉiuj Esperantistoj."

Nia nuna zorgo estas publikigi pli multajn artikolojn, kiuj ilustru diversajn facetojn de nia lingvo. Por tio ni alvokas al pliaj kaj novaj verkemaj Akademianoj. Ni hodiaŭ plezure prezentas al vi tekston de nia ĉina membro LI SHIJUN: li montras la vojon al siaj kolegoj.

Ni jam havas perantojn en kvin landoj; tri el ili estas en Amerikoj. Ni alvokas por novaj perantoj en aliaj landoj. Estas evidente, ke peranto en difinita lando signifas multe pli facilan abonon al nia organo. Ĉiuokaze la nombro de abonantoj rapide kreskas, kiam nova peranto ekaktivigas.

Alia plano estas la publikigo de nova kajero de la Oficiala Bulteno: ĝi entenos la Artojn III de la Akademio kaj alportos informojn pri la laboroj efektivitaj de la Akademio en la lastaj jaroj kaj ankaŭ resumos en unu sama kajero la tuton de la Oficialaj Informoj aperintaj en la sama periodo.

.../...



KRONIKO de la NUNTEMPO

LINGVO-NIVELOJ

En la XX-a jarcento ĉiu homo ja scias, ke en vivanta lingvo ekzistas pluraj niveloj uzataj laŭ la celoj: tion oni povus almenaŭ... supozi!

La ordinara nivelo respondas al la ĉiutagaj kutim-bezonoj de interkomunikado: ĝi estas kiel eble plej simpla surbaze de minimuma vortprovizo. En Esperanto ĝi estas la Fundamenta lingvo* de la korespondado kaj konversacio, sed pluraj volas ĝin ekskluzivigi kaj nur ĝin konsideri "La Bona Lingvo".

La lingvo-amantoj, kiuj ŝatas uzi ĝin por literaturo, emas doni al la lingvo-ŝtofo pli da elasteco kaj esprimiveco kaj sekve estigi ian beletran nivelon karakterizatan de tiel nomataj "poeziaj" ja elvokivaj vortoj kaj specialaj frazkonstruoj. Tiuj poetoj (en la etimologia senco) ne estas danĝeraj en lingvo, ĉar, se neniu imitas ilin, iliaj novaĵoj forfalas per si mem! Sed en Esperanto ŝprucas de tempo al tempo vanaj protestoj kontraŭ tiuj fi-nomitaj " neologismemuloj de Esperantalo".

Cetere pro la disvolviĝo de la sciencoj formiĝas nepre fakaj niveloj interne de sama profesio, urbo, regiono, kaj karakterizataj de aŭdacaj metaforoj aŭ elipsoj. Eĉ en Esperanto la uzado de vorto kiel "krokodili"* kaj de mallongigo kiel "Kiomas"^{**} estas simptomoj de estiĝantaj "slangoj" certe limigindaj.

Tiel la konstato de tiaj niveloj en Esperanto estas klara manifestiĝo de la lingvo-vivanteco: anstataŭ protesti kontraŭ ia "Esperantalo" aŭ kontraŭstarigi al la niveloj ian nocion de "Bona Lingvo", ĉiuj Esperantistoj ĝoju pri la vivpleneco de la Lingvo. J.T.

*) Fundamenta lingvo: ne nur de la Fundamento mem, sed responde al la Baza Radikaro Oficiala.

**) krokodili: paroli nacilingve en Esperantio.


***) Kiomas?: Kioma horo estas ?

(daŭrigo de la editoralo de D-ro A.Albault)

Ĝi plie donos diversajn administraciajn informojn, interalie la novan tekston de la Akademia Statuto kaj la listo de la nunaj membroj kune kun diversaj informoj pri ili. La redaktado de tiu kajero estas komencita, sed ĝi montriĝas kompleksa laboro.

Fine ni esperas, ke ni baldaŭ povos anonci la organizon de aparta kunveno de Akademianoj ie en Eŭropo. Verŝajne povos ĉeesti malgranda nombro da interesitoj.

D-ro André ALBAULT



PROMENADO INTER LA NUMERALOJ

LI SHIJUN

En la lingvoj, inkluzive de Esperanto, la numeraloj ludas tre viglan kaj gravan rolon, ne nur en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en la sciencoj. Ili estas inter la plej ofte uzataj vortoj. Tion klare montras al ni la statistikoj pri ĉ. 10 000 000 vortoj uzitaj en diversaj Esperantaj verkoj, laŭ kiu la Akademio de Esperanto pretigis la faman vortliston "Baza Radikaro Oficiala", en kiu la 2470 vortradikoj, vortfinaĵoj kaj afiksoj estas dividitaj en 9 grupojn laŭ ilia ofteco en uzado. Ĝia unua grupo de 179 plej ofte uzataj radikoj, finaĵoj kaj afiksoj enhavas la 12 numeralojn unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent kaj mil. (Por oportuneco, mi nomos ilin en tiu ĉi babilo la dekduo numeralo aŭ simple la dekduo.) Ili ja estas same ofte uzataj kiel la prepozicioj, konjunkcioj, pronomoj kaj afiksoj. El la dekduo numeralo, ni povas formi, per simpla kaj regula kunmetado, milojn kaj milojn da diversaj nombroj, kiel ekzemple: dek tri, tridek, tricent kvardek du mil cen sesdek sep. Kompare kun la numeraloj de la angla, franca, germana, itala, hispana kaj rusa lingvoj, la Esperantaj numeraloj estas multe pli simplaj kaj raciaj. Ĉe la dekduo numeralo ni vidas evidentan internaciecon kaj raciecon. Ĝi estas bona ekzemplo por montri la superecon de Esperanto.

Tamen pro nacilingvaj kutimoj, en la numeralan sistemon de Esperanto enŝteliĝis kelkaj neregulaĵoj, kiu iom komplikis la sistemon. Ekzemple, apud la dekduo numeralo ekzistas kelkaj variaj numeralaj substantivoj kiel ekzemple nulo, miliono (=mil miloj), miliardo, (=mil milionoj) kaj biliono (aŭ duiliono), kiuj estas uzataj alimaniere ol la dekduo. La dekduo estas nevariaj substantivoj, uzeblaj ankaŭ kiel adjektivoj por rekte determini substantivojn, kaj kiel pronomoj por reprezenti substantivoj, ekzemple:

1. Du kaj tri faras kvin. (kiel substantivoj)
2. Mi aĉetis ses librojn kaj du kajerojn (kiel adjektivoj)
3. El miaj kraĵoj unu estas ruĝa du estas bluaj. (kiel reprezentantoj, t.e. pronomoj).

La dekduo estas nudaj radikoj. Escepte de "unu", kiu en okazo de neceso povas ricevi finaĵon "j" aŭ "n" (kiel ekzemple: Unuj staras, aliaj sidas. Ni plenumis la taskojn unun post la alia) la dekduo numeralaj radikoj ne postulas vortfinaĵojn "j" kaj "n". Ili povas rekte determini substantivojn ĉu en nominativo aŭ en akuzativo. Miliono, miliardo kaj biliono ne povas esti uzataj por rekte determini substantivojn. Oni devas uzi la prepozicion "da" por interligi ilin kun substantivoj, kiel jenaj ekzemploj montras:

1. La urbo havas milionon da loĝantoj.
 2. Dek milionoj da popolanoj partoprenas en tiu movado.
- aŭ uzi adjektivigitajn formojn:

1. La urbo havas milionan loĝantaron.
2. Dekmiliono popolamaso partoprenas en tiu movado.

Ankaŭ la dekduo numeralo povas ricevi o-finaĵon por formi substantivojn, kiel ekzemple:

1. La dekduo da kraĵoj estas novaj.
2. Antaŭ miloj da jaroj oni jam kreis skriban lingvon.
3. Eble centon da jaroj ni bezonos por ĝeneraligi la uzadon de Esperanto tra la mondo.
4. Ni konstruos trion da novaj domoj.

Tamen tiajn o-vortojn oni uzas multe malpli ofte ol la nudajn radikojn, ĉar ĉi tiuj ja estas pli simplaj kaj pli oportunaj, sen bezono de la aldonado de "da".

Pro la montrita diferenco inter la dekduo numeralo kaj la variaj substantivoj numeralaj miliono,, miliardo k.s;., komplikaĵo prezent-

iĝas en la praktika uzado, kiam ili estas kune uzataj por diri grandajn nombrojn. Legu jenajn ekzemplojn:

1. En la urbo vivis miliono da homoj.
2. Pasintjare naskiĝis dumil tricent sesdek infanoj.
3. Nun en la urbo vivas 1 000 001 homoj.
4. Tiu urbo havas 1 000 001 loĝantojn.

Je la unua vido, la nombroj en la frazoj ŝajne ne prezentas problemojn. Sed ne tiel estas kun la 3-a kaj 4-a frazoj. Kiamaniere oni devas laŭtlegi ilin? Ni provu:

1. Nun en la urbo vivas miliono unu homoj.
2. Nun en la urbo vivas miliono da homoj kaj unu homoj.
3. Nun en la urbo vivas miliono da homoj kaj unu homo.

Kiu el la tri estas ĝusta maniero por laŭtlego de la supredonita 3-a frazo? Miliono postulas uzon de da, sed unu ne, tiu ĉi povas rekte determini substantivon, sed substantivon en singularo. Post miliono da la komplemento homoj devas stari en pluralo. Jen kontraŭdiro nesolvebla sen ripeto de la vorto "homo".

La kvara frazo prezentas ankoraŭ pli komplikan problemon. Oni devus ĝin laŭtlegi jene:

1. Tiu urbo havas milionon da loĝantoj kaj unu loĝanton.
2. La urbo havas milionon kaj unu loĝantojn.
3. La urbo havas milionon da loĝantoj kaj unu loĝantojn.

Ĉu ili povas esti akceptitaj? Neniu el ili tute konformas al la supredonita frazo. La kuna uzado de la du specoj de numeraloj komplikas la aferon. Estas dezirinde unuecigi la du kategoriojn de numeraloj.

La Plena Analiza Gramatiko diras en la 86-a paragrafo: "pro deziro al unuformeco, kelkaj, eĉ tre konservativaj, uzas nevarian formon nul." Ĉu PAG konsilas, laŭ tio, uzi la nudajn radikojn nul, milion, miliard ktp. same kiel la dekduon? Efektive ne. En Rim. I. sur la sama loko PAG diras: "La variaj numeraloj (ligiĝas kun la sekvanta substantivo) pere de la prepozicio da: (unu) miliono da pundoj; du miliardoj da markoj. Normale nulo apartenas al tiu kategorio, kaj oni devas diri: nulo da horoj; sed estas preferinde uzi la nevarian formon de tiu numero kaj diri: la ekflugo okazos je nul horo kaj dek kvin minutoj." "Numero" estas vicmontra numeralo, do la aŭtoroj de PAG preferas uzi nul por montri vicon, kiel unuan, duan, trian, ktp., sed ne kiel la nevariajn radikojn unu, du, tri, ktp. Kial PAG ne proponas uzi nul por montri nombron? Eble pro tio, ke nula jam estas uzata por montri nombron kiel miliona. Laŭ la Plena Ilustrita Vortaro, nula signifas: "Neekzistanta: havanta nenian efektivan valoron."

Kiel ni scias, la a-vortoj unua, dua, tria, kvara, kvina...deka, centa, mila ktp. montras vicojn, sed la a-vortoj miliona, miliarda, kelka, multa, esprimas nombrojn. Por montri vicojn, oni devas uzi la formojn kelkea, multea, milionea, miliardea. Se oni povus uzi la formojn milion, miliard, kelk, mult k.s.; por montri vicon same kiel nul laŭ la citita rimarko de PAG, oni povus eviti uzi la iom strangajn formojn milionea, miliardea, kelkea, multea k.s. Estus dezirinde tion fari, ĉu ne?

Sed en la praktika lingvouzo tamen montriĝis alia tendenco.

K. Kalocsay, unu el la kunverkintoj de PAG uzis la radikojn kelk kaj mult ne kiel numerojn, sed kiel bazajn numeralojn. Ekzemple, en la 68-a verso de la dekoka kanto de la majstra traduko de "Infero" de Dante, Kalocsay uzis la esprimon: "post kelk paŝoj ni alvenis al

pont'..." kaj en la 40-a verso de la dudeksepa kanto "Ravenna, kiel de mult jaroj, staras."Kredeble, Kalocsay uzis la nudajn radikojn kelk kaj mult pro metronika bezono en sia traduko, tamen tio klare montras, ke li tendencas uzi kelk, mult k.s. unuforme kun la dekduo numeralala.

Efektive, ne nur en poezia lingvo oni montris tian tendencon uzi ĉiujn numeralojn unuforme. Ekzemple, en sia populara romano originala "Eùlalia", s-ro Lorjak uzis la nudan radikon milion en jena esprimo sur paĝo 93-a:

- Kvindek mil planedoj (planedo estas monunujo).
- Novaj aù malnovaj?
- Novaj kompreneble. Alivorte kvin milion planedoj.

Se ni povus ĝenerale uzi la nudajn radikojn milion, miliard k.s., ni povus diri senprobleme:

1. Nia urbo havas milion unu loĝantojn.
2. Milion dek du homoj loĝas ĉi tie.
3. Hodiaù naskiĝis la milion-unua infano.

Eble iuj opinias, ke la formo milion estas neoportuna, ĉar en Esperanto estas la vorto milio kaj milion estas ĝia akuzativa formo. Efektive, en la sesdekaj jaroj mi jam rimarkis en iu eùropa Esperanta gazeto (verŝajne Franca Esperantisto) la formon miljon por la nombro mil-mil. Mi mem plurfoje uzis ĝin pro ĝia oportuneco. Mi pensas, ke ankaù miljard kaj biljon estas preferindaj, ĉar pli mallongaj kaj nemalpli klaraj.

Se ni ĝenerale uzus la nudajn radikojn kelk, mult, plur, miljon, miljard, biljon, ktp. tiam ni ne plu bezonus uzi tiel ofte la pozicion "da", kiu iom strange kondutas en la lingvo. Ekzemple, sub la artikolo da, en la Plena Ilustrita Vortaro ni povas trovi jenan ekzemplon donitan de Zamenhof: "Da ĉevaloj ili havis 736." Kaj en la libro "Medaliono" tradukita de pola s-ro Tadeusz Hodakowski, ni povas trovi sur p.17-a jenan ekzemplon: "Por bezonoj de la Anatomia Instituto ĉe la universitato sufiĉus provizo de dekkvar kadavroj. Ĉi tie da ili estis tricent kvindek." La ciferoj 736 kaj 350 ja ne postulas uzon de da. Kial oni ne povas diri "Ĉevalojn ili havis 736." "Ĉi tie la nombro de ili estas tricent kvindek"? Kredeble la da-ismo devenas de nacilingva kutimo.

Pro la uzado de da en nia lingvo ekzistas jena stranga fenomeno:

1. Multe da homoj ŝatas uzi ĝin.
2. Iom da akvo estas trovebla en ĝi.

Kio estas la subjekto de la du frazoj? Multe kaj iom? Ĉar estas erare kompreni la frazojn kiel jene: "Iom estas trovebla", "Multe ŝatas uzi ĝin". Ĉu homoj kaj akvo estas la subjektoj de ili? Neeble, ĉar ili estas komplementoj de "da", ili ne estas ĉefaj vortoj, sed akcesoraj vortoj. Tamen laù la sencoj de la frazoj homoj kaj akvo estas la subjektoj, ĉu ne? Estas evidente, ke en tiu ĉi kaŝludo la vorteto "da" ludas la ĉefrolon. Se oni povus diri "mult homoj" kaj "iom akvo" ni povus eviti tian neraciaĵon.

En sia 84-a paragrafo PAG diras en Rim.III: "En la frua lingvo oni uzis kiom kaj tiom ankaù sen da. La samon oni trovas ankaù en la poezia lingvo ĉe Grabowski kaj aliaj: "Kiom homojn vi vidis? min mirigas tiom stultaĵoj de via flanko". En la poezia lingvo ĝi ŝajnas allasebla kaj estis aprobita ankaù de Zamenhof." Pripensu jenajn frazojn, eble vi pli bone vidos la malsanecon de da-ismo:

1. Mi havas du manojn.
2. Kiom vi havas?
3. Mi havas manojn.

4. Kiom mi havas?
5. Mi havas du.

Ĉu en tiuj esprimoj troviĝas neceso uzi "da"? Estas dezirinde simple diri: "Kiom manojn mi havas?". Ni povas rigardi kiom, tiom, iom, ĉiom kaj neniom kiel membrojn de la numerala familio, ĉu ne?

Nereguleco troviĝas ankaŭ en la uzado de la adjektivaj vortoj ioma, ĉioma, ma, nenioma, tioma kaj kioma. PAG skribas en Rim.II en la 84-a paraĝrafo: "Pro la vicmontra signifo de la a-finaĵaj formoj oni ne uzu kioma kaj tioma en la senco kvanta. Do, ekz., kioman horon vi havas? estas tute malkorekta. Plipardoneble estas tiel uzi ioma, ĉioma kaj nenioma, ĉar ili apenaŭ povas esti uzataj en vic-montra senco." Kaj PIV skribas, ke "ĉioma" signifas: "Tutkvanta, tutplena". Ni ĉiuj al-kutimiĝis al uzado de jenaj esprimoj:

1. Kioma horo estas nun?
2. Nun estas la naŭa.

Evidente, kioma montras vicon, ne kvanton. Sed ja multaj uzas esprimojn kiel jenajn:

1. Ioma pacienco estas necesa.
2. Li foruzis ĉioman energion kaj materion.

La membroj de la familio iom, kiom, tiom, neniom elektis por si mal-samajn rolojn! Ĉu oni ordonu, ke ili ŝanĝu siajn funkciojn kaj prenu uniformon?

Lingvo estas afero de konvencioj, tial en la naciaj lingvoj estas multe da neregulaĵoj kaj idiotismoj, kiuj malfaciligas la lernadon de ili. Se ni volas, ke Esperanto estu facila, ĝi devas esti kiel eble plej regula kaj senescepta. La tabelo de la korelativaj vortoj estas genia eltrovaĵo de Zamenhof sub la gvida principo de reguleco. Tamen ankaŭ en tiu tabelo troviĝas io neregula, nome la uzado de kial. En tio ne kulpas Esperanto, sed la kutimoj de la naciaj lingvoj, kiuj influadas la racie faritan lingvon.

Pri la uzado de ordaj numeraloj en esprimado de tempo, Zamenhof donis la ekzemplon jenan:

G.Vaŝington estis naskita la dudekan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.

Sed hodiaŭ ni kutime diras:

1. Komence de Aŭgusto 1988 en Moskvo estas fondita nova E-organi-zaĵo
2. Oni lin enkarcerigas, unue en 1592 kaj poste en 1603.
3. Mi ripetas, ke vi skribis ĝin en 1963 kaj ni estas ankoraŭ nur en 1962.
4. La kunveno okazas 1990-11-08
5. Alarmŝtupo 2 (anstataŭ dua).

ne nur en presaĵoj oni uzas anstataŭ vicmontra "1990-a" la bazan numeralon 1990, ankaŭ en konversacioj oni kutime diras "en la jaro mil naŭcent naŭdek". Kredeble, ankaŭ tia tendenco devenas de naci-lingvaj kutimoj. Reguleco estas dezirinda, tamen ŝajne rigida regul-eco neblas, ĉar ankaŭ oportuneco estas dezirinda. Nur la praktik-antaj amasoj de la lingvo decidus ĝian vojon de evoluado.

LI SHIJUN

BIBLIOGRAFIO

- | | |
|---|--|
| 1. Fundamento de Esperanto. | 7. Nuda inter lupoj. |
| 2. Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. | 8. Perfekta civitano. |
| 3. Plena Ilustratita Vortaro de Esperanto | 9. La Inĝenia Hildago Don Quijote de la Mancha |
| 4. Infero (trad.K.Kalocsay). | 10. "Esperanto"- 11. "Paco" |
| 5. Medaliono. | 12. "El Popola Ĉinio", k.a. periodaĵoj. |
| 6. Eŭlalia. | |

(Demandoj kaj respondoj...)

tiu vorto esprimas... Sed kiam progresinta komencanto lernus jam pri ata/-ita, certe li ankaŭ bone komprenus la "nomata, nomita"... Estus konvene uzadi la vorton "nomiti" anstataŭ "nomiĝi". (A.S.-Havirov)

R.- Demando iel simila al medialo. Sendube PIV ne registras la vorton nomiĝi; kaj en PAG (§ 359) estas legeble: " "Nomiĝi" (estas) uzata ne en la senco iĝi noma, sed en la senco esti noma (nomhava). Tie ĉi necesus la formo: "nomati". Sed neniu imitis la proponon de PAG; kaj vi proponas "nomiti"...

Nu, la demando, ne plene, sed iel similas tiun pri "sidiĝi". D-ro L.L. Zamenhof respondis en "La Revuo" (1906, Decembro) jene: "...Anstataŭ "sidiĝu" jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam "esperantismo" kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu util-eco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton." Pli bonan prezenton de la tradicia valoro en lingvo oni ne povus trovi. (J.T.)

D. Ĉu tiel...kiel... aŭ tiom...kiom...?

"Mi diferencas, ĉu mi estas tiel forta kiel persono X (do mi kondukas kiel li) kaj ĉu tiom forta kiom persono X (do je la sama potencgrado), ne maniero, sed kvanto... (V.O. Aŭstrio).

R.- " Mi estas tiel forta, kiel vi" (Fundamento, §10). Estas fakto, ke por samgradigaj komparoj la FUNDAMENTO indikas nur la korelativojn tiel ...kiel . Kaj D-ro L.L. Zamenhof principe uzis la korelativojn tiom...kiom strikte nur por kvanto: " Kiom da kapoj, tiom da opinioj." Ĉi-rilate la Plena Analiza Gramatiko (§ 88, Rim.VII) rimarkigas:

" La uzo de tiom por esprimi gradon, nomata de de Hoog kiom-malsano, estas tute ne-zamenhofa; ĝi havas krome du malavantaĝojn: unue, kiel trafe diras de Hoog, la fonetika valoro de om estas multe pli peza ol tiu de el, tial teksto kun multaj kiel -oj restas flua kaj facile elparolebla, dum la sama teksto kun kiom-oj sonas peze, "morne"; due, uzante ĉiam tiom...kiom..., oni perdas la eblon apliki ilin en la okazo, kima oni bezonus ilin por esprimi nuancon. Du tiaj okazoj estas: a) se oni volas aparte emfazi la esprimon: la esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion tiom perfektan, ke nenio pli alta jam povus ekzisti (Z) (la substreko de tiom estas de Zamenhof mem); b) se oni volas eviti miskomprenon pro la kroma kompareca signifo de kiel: li estas, kiel verkisto, tiom inteligenta, kiom stulta, kiel financisto. Sed tiaj okazoj kompreneble estas esceptaj kaj prezentas sin tre malofte."

Unuvorte sistema uzo de tiom...kiom... anstataŭ tiel...kiel... atencas la Fundamenton kaj simple malriĉigas la lingvon je stil-efektoj en okazo de bezono.

(J.T.)

LOKAJ, REGIONAJ, NACIAJ KAJ INTERNACIAJ ESPERANTO-ORGANIZAJĜOJ ABONU KAJ DISKONIGU "LA LETERON DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO". TIEL VI HELPAS LA AKADEMION DE ESPERANTO DEFENDI KAJ EVOLUIGI LA INTERNACIAN LINGVON DE D-RO L.L. ZAMENHOF!

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

" Ne gravas, se foje vi ne konsentas...

La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj!

La sola problemo estas konscii pri tia neceso...

Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

D.- Ĉu apert/i aŭ apert/a?

" En PIV estas registrita la radiko apert/ kun la signifo adjektiva. Tion mi komprenas facile, sentante ĝin kiel particip-devenan el la latina verbo aperire = malfermi. Sed mankas en PIV indiko, kiamaniere verbigi la radikon. Laŭ mia latineska lingvosento mi emus interpreti eventualan verbon aperti kiel la latinan patere = esti malfermita.

(Ja Cicerono ordonis al Katilino: " Egredere ex uebe! Patent portae, proficiscere!). Pro tio mi povas apenaŭ partopreni la kuriozan opinionon, ke aperti = malfermi, t.e. kun la signifo transitiva. Mi listigu la vortarojn, en kiuj mi trovis la - laŭ mi - eraran interpreton:

1961, Albault: ouvrir (une boîte, une porte) malfermi, aperti.

1969, Wells: apert/i, -a open tr.

1970, Seemann: apert/i, otvorit.

1974, Bokarev: apert/i vt nov odkritj (=malfermi).

Male, mi aŭdacas rezoni jene: malfermi = fari ion aperta, do apertigi! Se oni tamen insistus procedi laŭ la supre menciitaj vortaroj, generiĝus semantika haoso: mi apertas pordon, do la pordo estas fare de mi apertata. La lasta vorto estus "duoble participa", ĉar la radiko apert/ jam per si mem signifas rezulton de l'ago..." (J.K. Praha-).

D.- Jen tre interesa demando! Kaj pri la radiko mi konsultis du pliajn vortarojn: 1955, G. Waringhien: apert/i = malfermi, /a ouvert /aĵo - -aperturo.

1934, Plena Vortaro : apert/i - malfermi; -aĵo = aperturo.

Tiel la verba karakterizaĵo datiĝas de longe kaj verŝajne ĉiuj postaj vortaroj ripetis la dekomenca alprenitan valoron. Sed vi prave rimarkigas, ke PIV modifis ĝuste la signifon de "apert/i" al "apert/a".

Kiel interpreti tion? Ĉu Prof. G. Waringhien volis inviti la estontajn legantojn de PIV ekuzi apertigi anstataŭ aperti. Tion oni povus des pli kredi, ke en PIV estas menciita alia neologismo kun la valoro: malfermi, t.e. "ovr/i".

Aliflanke apert estas la supina formo de la latina aperire, kaj ne malofte okazis, ke supinaj formoj de la latina generis infinitivojn en la franca kaj angla lingvoj. Ĉu eĉ ne en Esperanto/ iniciati elde iniciare? (J.T.)

D.- Ĉu nomiĝi aŭ nomiti?

"En lernolibroj por komencantoj oni instruas pri iĝi, ke ĝi signifas ŝanĝon de stato, sed tute certe en la sama lernolibro estas trovebla la vorto nomiĝi. Ekspliku do al komencanto, kian ŝanĝostaton ...

(daŭrigo s.p.7)

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l'Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS-Francio; - Redaktoro: Jean THIERRY.- Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX.- Presejo: COCONNIER. 72300 SABLÉ. C.P.P.P. n-ro 6971.- 1 n-ro: 40 FRF. Jara abono: 120 FRF, Pagebla ĉe kontoj: banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F. Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris.- UEA: Poŝta banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l'Akademio de Esperanto".

Peranto por Svedio: Sveda Esperanta Federacio- c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl.455-S 242 94 HORBY-Svedio.

Peranto por Brazilo: Brazila Esperanto Ligo- ScS Ed Jockey Club-Sala 103. 70300 Brasilia DF (caixa Posta 11 11 05)- Brazilo-

Peranto por Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-redakcio de Radio Havano)- Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA-Cuba/

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur.3493 villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan México DF Meksiko.

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio.